

Invito al la 19-a "Rata★Rendevuo" en Hameln kaj Hess. Oldendorf sabaton+dimanĉon, la 22.+23. de okt. 2022 Jubileo 35 jaroj „La Ratkaptista Bando“



La „Ratkaptista Bando“ invitas vin al Hameln kaj Hess. Oldendorf. Ni ŝatas festi kun multaj Esperanto-amikoj kaj gastoj nian jubileon kaj esperas, ke ni kune povos ĝui du belajn tagojn. Senkosta parkejo en la korto de la Sumpflume (dekstre de la konstruaĵo) aŭ maldekstre apude publika parkejo por 2,- € tage. Vojo piede stacidomo>Sumpflume: 1,2 km, ĉ. 15 min. Telefono por informoj kaj demandoj: **+49 162 7536396**.

Libroservo de FEL sabaton: Vi havas eblecon aĉeti librojn de la Libroservo de Flandra Esperanto-Ligo. Por esti certa, ke via libro ĉeestos, **bonvolu antaŭmendi ĝin**. Iru al la Retbutiko de FEL <https://retbutiko.be/>, aĉetu ĝin tie kaj **nepre aldonu "Kunportu al la 19-a Rata Rendevuo en Hameleno"** (aŭ skribu rekte al butiko@fel.esperanto.be).

La programo sabate:

ekde 10:00: Renkontiĝo en la kultur- kaj komunikadcentro Sumpflume, Am Stockhof 2a, Hameln. Salutado kaj Rerigardo al 35 jaroj Esperanto-grupo Hameleno.

10:45: Prelego BET (Baltiaj Esperanto-Tagoj) en Klaipeda, Litovio, kun Conny Klee.

12:00: Komuna tagmanĝo en la restoracio „Shangri-La“. Bonvolu antaŭmendi vian manĝaĵon: vidu sube http://web2.cylex.de/menu_viewer.ashx?fid=11564695&cid=45937

14:00: Ĉiĉeronado tra Hameln kun Renate Schulte: Münster kun kriptoj, Begina korto, renesanco kaj la Ratkaptisto, ... Kion Hameleno ankoraŭ povas oferti? (Kunveno ĉe Senior-Schläger-monumento, Münsterkirchhof).



alternative: 14:00: Escape-Room „Sekreto de Wenzel“, Volba kelo sub la Münster (kunveno ĉe la puto flanke de la preĝejo), maks. 6 personoj. <https://www.escapeandmore.de/unser-raum>
Rataj plagoj, pesto, mornaj tempoj... Venu kun ni en la jaron 1284. Volba kelo profunde sub la Sankta Bonifacio. Ordona frato Wenzel ŝajne planas ion. Strangaj aferoj okazas en lia ĉambreto. Lia konduto dum la pasintaj semajnoj estas pli ol stranga... Kion li nur planas? Ĉu li perdis sian vojon?

16:00: Aŭtora legado en la Sumpflume: Mathias Müller: Liebe, Tod und Esperanto (en la germana): En la jaro 2005 Adrian Schlayer neatendite ricevas viziton de Vigdis, belulino el Islando. Ŝi parolas por li tute ne kompreneble. Unu

horon poste li kaj lia vizitantino staras antaŭ du kruele pretigitaj kadavroj. Per tio por Adrian komenciĝas ĉasado super la duonan terglobon. Dum tio li konatiĝas kun la mondo de Esperanto. Membroj de mondvasta reto de tiu planita lingvo helpas al li kaj lia akompanantino. Apenaŭ Adrian kaj Vigdis eskapas la morton, ankaŭ pro tio, ĉar Adrian kapablas rapidege mont-malsupren-bicikladi. Dum la fina alfronto en Islando Adrian staras kun sia montbiciklo antaŭ la plej kruta descendbiciklado de sia vivo. Sub li en la valo Vigdis, sia granda amo, kuras al sia morto.

<https://www.hugendubel.de/de/taschenbuch/mathias-mueller-liebe-tod-und-esperanto-42145944-produkt-details.html>

17:15: Prelego Itala Kongreso en Breŝo, Italio, kun Heinz W. Sprick.

18-20 Uhr: Libera tempo, ekz. por vespermanĝo aŭ eta manĝeto en la urba centro.

20:00 Koncerto: Kaŝi kaj jOmO:

Kaŝi (Carsten Schnathorst) estas blinda germana muzikisto kaj Esperantisto. Li devenas de Osnabrück kaj loĝas en Hamburgo. Tie li ludas en la bando „The living Music Box“. Kaŝi kantas kaj ludas pianon. Lia repertuaro entenas proprajn kantojn kaj tre konatajn kantojn el la tuta mondo.

Dum la internacia vespero ĉe SES 2013 en Martin aperis nova talento en Esperantujo. Kaŝi prezentis sian unuan mem skribitan Esperanto-kanton. Dum SES 20214 en Nitra jam okazis lia unua tutvespera koncerto en Esperantujo. Li ĝojigis la korojn de la publiko kun sia miksaĵo el propraj kantoj, internaciaj furorkantoj kaj per la helpo de sia elstara voĉo.



jOmO (Jean-Marc Leclercq) estas franca kantisto kaj Esperantisto. Li devenas el Liono kaj nun loĝas en Tuluzo. Li komencis muziki en 1977 kaj eklernis Esperanton en 1988. Li havas tradician kaj rokan kantrepertuaron en 22 lingvoj, inter ili ankaŭ Esperanto. Per tio li staris en la Guinness-libro de la rekordoj. En 2007 li kantis 25 kantojn en 25 lingvoj en la brita ĝardenurbo Letschworth. Li komencis kiel kantisto en la de li fondita grupo Les Rosemary's Babies (La Rozmariaj Beboj). La bando faris turneon en diversaj landoj (interalie Ĉinio), produktis du albumojn, kaj eĉ koncertis sur la prestiĝa scenejo Olympia. Post la disiĝo de la „Beboj“ JoMo fondis novan grupon, Liberecanoj, kun kiu li registris KD-on ĉe Vinilkosmo. Poste li sole registris tutan albumon, kun la titolo „JoMo friponas!“, aperinta en 2001. La sekva KD „jOmO slavumas“ aperis en 2006 kun muziko en slava stilo. 2016 apris la KD „JoMo okcitanas“ kaj 2021 la KD „Marta kaj jOmO kantas MAjoma“, inspirita de afrikaj kantoj.



O Dimanĉon mi povas kunporti personojn de Hameln al Hessisch Oldendorf O ... kaj reen.